Heinrich Heine,

# [Diru vi, ho karulino]

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Diru vi, ho karulino,
Nun al mi, ĉu estas vi
Sonĝobild' el mia sino,
El poeta fantazi'?

Sed ne! Tian infaneton,
Tian ravan brilon de
La okuloj, la buŝeton,
Kreas la poeto ne.

Baziliskojn, vampiraĉojn,
Drakojn, de l' infero la
Plej timigajn fi-bestaĉojn
Kreas la poeto ja.

Sed ne! Vin, malicon vian,
La vizaĝon ravan, - ve! –
La rigardon false pian
Kreas la poeto ne.

*Traduko de la Germana poemo "[Liebste, sollst mir heute sagen]" de* Heinrich Heine *(*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de* Manfred Retzlaff *(*1938-11-04).*

*Arg-555-1120 (2010-09-13 20:55:11)*

*La poemo troviĝas en la „Libro de la kantoj", sekcio „Junaj suferoj - romancoj", n-ro XVI.*

Heinrich Heine,

# [Karulin', vi devas diri]

*tradukita de Leopold Blumental*

Karulin', vi devas diri,
Ĉu ne sonĝo estas vi,
En somera tag' florinta
El poeta fantazi'?

Ne! erar'! ... Buŝeton tian,
Sorĉon de la okulet',
Tiel dolĉan knabineton
Ne ekkreos la poet'!

Nur vampirojn, baziliskojn,
Monstrojn, idojn de malam',
Nur terurajn fablajn bestojn,
Poetara kreas flam'!

Vin do ... kaj ruzecon vian
Ĉe anĝela vizaĝet',
La rigardojn piajn .., falsajn ...
Ne eksonĝos la poet'!

*Traduko de la Germana poemo "[Liebste, sollst mir heute sagen]" de* Heinrich Heine *(*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de* Leopold Blumental *(Leo Belmont, *1865-03-08 – †1941-10-19).*

*Arg-555-1122 (2010-09-13 22:21:04)*

*Mi, Manfred Retzlaff, kopiis tiun ĉi tradukon el la libreto "H. Heine - Libro de Kantoj", eldonita en 1911 de la "Esperanto-Propaganda Instituto" (Leipzig, Kaiser-Wilhelm-Str.15), 2a eldono. [Sur la frontpaĝo de la kajero estas malsupre indikita ankaŭ: Eldonejo Rothermel, Friedrichswerth (Thüringen) kaj supre: Popola Biblioteko Esperantista n-ro 2.] La germanan originan version verkitan de Heinrich Heine vidu: "Buch der Lieder", sekcio "Lyrisches Intermezzo", n-ro XVI. - Informoj pri la tradukinto Leopold Blumental (kaŝnomo: Leo Belmont) troviĝas en la vikipedia retejo* `http://eo.wikipedia.org/wiki/Leo_Belmont`.